

Parolas sinjorino Andrée Gacond.

Hodiaŭ, kaj verŝajne la venontajn semajnojn, vi aŭdos monologon anstataŭ dialogo, ĉar, pro akcidento, mia edzo, Claude Gacond, ne povas vojaĝi al Bern.

Ni, esperantistoj, havas literaturon atentindan, originalan, kiun ni havas la devon studi, kiel ni studas niajn nacilingvajjn literaturojn. Por tion fari ekzistas malfacilaĵoj. Unu estas, ke oni ne sufiĉe reeldonas niajn malnovajn verkistojn, kaj ke la novaj esperantistoj ne facile povas akiri iliajn verkojn. Alia malfacilaĵo estas, ke kelkfoje verkistoj dispartigis sian penson en multaj artikoloj, kiuj poste estis nesufiĉe aŭ tute ne kompilitaj. En tiu kategorio troviĝas ekzemple Lanti, interesa socialista pensulo, kaj Hector Hodler, la iniciatinto de Universala Esperanto-Asocio. Hodiaŭ mi legos al vi kelkajn erojn el artikolo de Hodler, esperante instigi intereson por tiu verkisto.

El artikolo titolita *Pripensoj* aperinta en la revuo *Esperanto* de decembro 1913, mi legas al vi la portreton de **sinjoro Laborulo** en la Esperanto-movado. Aŭdu :

« Mi estis eltironta konkludojn el la supraj pripensoj, kiam meze de duonkonscia cerbumado, prezentiĝis al mi subite, mi ne scias kial, la bildo de mia amiko Laborulo. Utilos verŝajne, ke mi lin prezentu, ĉar de multaj el ni li ne estas bone konata. Sinjoro Laborulo ne estas tre eminenta persono. Malofte vi vidos lin sur estrado. Se li tamen kuraĝas ekparoli – cetere ne per tre brilaj frazoj – tio estas pli por esprimi opinion kaj ideon, ne ĉiam malpravajn, ol por ĝui aplaŭdojn. Al la gazetoj li tre malofte sendas literaturajn tradukojn (tion li faris, nur kiam li estis lernanto) kaj mi ne timas pretendi, ke li eĉ ne faris versaĵon. Sinjoro Laborulo estas modesta oficisto, kiu, fininte sian ĉiutagan laboron, dediĉas la liberajn horojn al nia afero. Pri esperantista politiko li malmulte sin okupas kaj, verdire, mi suspektas, ke li ne ankoraŭ havas pretan solvon por sukcesigi Esperanton, sed unu aŭ dufoje en la semajno sinjoro Laborulo faras esperantan kurson. Li penas ne sole instrui la lingvon, sed ankaŭ ĝin utiligi tiel, ke liaj instruistoj ne perdu sian tempon. Li atentigas ilin, ke Esperanto estas viva lingvo kaj kiel ĉiu tia lingvo devas esti respektata. Li gardas ilin je ŝanĝemo aŭ gramatiko-manio, sed same gardas sin insulti tiujn, kiuj ne pensas same. Kompreneble la duono de la lernantoj forkuras, sed tio lin ne senkuraĝigas. Li scias, ke inter la homoj estas amaso da amatoroj kaj malobstinuloj. Li penas eduki la restantan duonon. Tiel lia laboro neniam estas tute vana. Sinjoro Laborulo, se mi ne eraras, estas sekretario aŭ kasisto de la grupo. Oni ŝatas lin, ĉar li havas ordon. Bona administranto li estas. Ne multon li promesas, sed kion li promesas, tion li faras ĝustatempe. Mi tre dubas, ĉu li estus kapabla fari teorian disertacion, ĉu Esperanto estas nur lingvo aŭ ĉu ĝi estas socia movado, sed ĉiuokaze mi scias ke, kiam li ricevas leteron, li ĝin legas kaj respondas. Kvankam li estas fervora grupano, membro de nacia societo, kaj eble ankaŭ de faka grupiĝo, li akceptis esti delegito de UEA. La cirkulerojn, kiujn li ricevas, li penas plenumi. Li ne tuj skribas : « Senutile estas klopodi, ĉar mi ne sukcesos » aŭ « Niaj samurbaĵoj estas tre indiferentaj », sed li almenaŭ provas. Vere li ne ĉiam sukcesas, sed almenaŭ el kelkaj tiaj klopodoj, iuj havis pozitivan rezulton. Mi neniam aŭdis, ke en iu ajn kongreso li kompetente parolis pri la diferenco inter per- kaj por-esperantaj organizaĵoj, nek ke li severe admonis UEA resti en la limoj de ĝia agado, sed lia grupo eldonis gvidfolion, kiun UEA disdonis. Ĉu oni kuraĝos kredi, ke tiu strangulo ne ĉiam surportas verdan stelon, nek al ĉiuj ajn personoj parolas pri Esperanto ? Tamen la elektitaj personoj, kiujn li varbis, estas seriozaj kaj fidelaj al nia movado. En lia urbo li ne estas konata kiel fantaziulo, kiu senĉese ripetadas la vorton Esperanto. Ne, oni respektas lin. Glumarkojn li ne kolektas (verdire li tion permesas al sia knabeto), sed li regule pagas siajn kotizojn kaj abonojn. Mi devas aldoni, ke li sincere kantas

***La Espero** ĉe la kongresoj kaj same sincere kredas, ke la amo al la homaro, kiun Esperanto ĝermigis – ne forigas la amon al la patrujo – sed li ne ĉiam havas en la buŝo la vorton « frateco » kaj « amo », ĉar li malprecize konscias, ke tre ofta uzado de tiuj noblaj vortoj forprenas iom da ilia sankteco. Fine, mi scias, ke sinjoro A., la vicprezidanto de la grupo, ne plaĉas al li. Li tamen ne ankoraŭ insultis lin, filozofie li premas lian manon en la intereso de la paco, kvankam vere... Cetere mia konatulo, mi tion forgesis diri, estas ne heroo, nek apostolo, nek pioniro. Li estas simple... Laborulo.. ».*

Ĉu sinjoro Laborulo havas multajn samspeculojn en Esperantujo ? Mi ne kuraĝus jese respondi, sed ĉiuokaze mi scias, ke de ilia multeco, pli ol de tia aŭ alia teorio, dependas niaj estontaj progresoj. Unue vivi, poste filozofii.

Vi aŭdis parton de artikolo de Hector Hodler, kiu provis, observante la esperantistan medion antaŭ kvindeksep jaroj, puŝi nian movadon antaŭen. Ŝajnas al mi, ke multaj rimarkoj tiel lerte kaj bonhumore notitaj ankoraŭ indas nun je pripenso.

Tiun tekston, kun kelkaj aliaj artikoloj de Hector Hodler, troviĝas en libreto, kiun UEA eldonis en 1928 okaze de sia dudekjariĝo. Tiu libreto entenas ankaŭ mallongan biografion de Hector Hodler verkita de Ed. Stettler. Ĝia titolo estas: *Hector Hodler, lia vivo kaj lia verkaro*.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

-oOo-